Februaro 78

La cirkulero 2012

CENTRE CULTUREL ESPERANTO TOURAINE
Maison des Sociétés, Halles de Tours
Place Gaston Paillhou
37000 TOURS
02-47-55-20-10 ou 02-47-20-43-95

esperanto-touraine37@wanadoo.fr

http://esperanto-tours.1s.fr

Prezidanto	Dominique Baron, 15, impasse Marat, 37700 SAINT PIERRE DES C. ; 02 47 44 62 12
Vicprezidantoj	Juanita Turbillon, 4, jardin Ockeghem, 37000 TOURS ; 02 47 20 43 95
	Pierrette Formen, 52, rue de l'Auberdière, 37510 SAINT GENOUPH ; 02 47 45 51 58
Kasisto	Hélène Alessandri,
Sekretario	Jacques Gaumé, 6, imp. des Primevères, 37390 CHANCEAUX S/CH. ; 02 47 55 20 10

KIO OKAZIS ĴUSE ?

Sabaton, la 7-an de Januaro, en Les Halles, ni gustumis la tradician reĝan kukon.



Tiujn 2 fotojn kunigitajn permesis fari bondeziran karton senditan al membroj, kiuj ne plu povas ĉeesti niajn kuvenojn.

Sabaton, la 11-an de Februaro, en Les Halles, okazis la ĝenerala asembleo. Denise Le Brizault deziris lasi sian postenon, Hélène Alessandri konsentis esti nia nova kasistino.



QUE S'EST-IL PASSÉ RECEMMENT ?

Samedi 7 janvier, aux Halles, nous avons dégusté la traditionnelle galette des rois.



Ces 2 photos mises ensemble servirent à faire une carte de vœux qui a été envoyée aux membres qui ne peuvent plus participer à nos réunions.

Samedi 11 février, aux Halles, c'était l'assemblée générale. Denise Le Brizault désirait céder sa fonction, Hélène Alessandri a accepté d'être notre nouvelle trésorière.





Hélène Alessandri,
nia nova kasistino

VENONTAJ GRAVAJ DATOJ

Merkredon, la 14-an de Marto alvenos el Caen, Rodica Todor, kiu turneos en Francio por prelegi. Vespere ni invitos ŝin partopreni en la 3-a grada kurso kaj en la paroliga rondo.

Vendredon, la 16-an, je la 17-a ½, salono 121 en Les Halles, Rodica Todor prelegos pri Rumanio.

Post tiu prelego, ni vespermanĝos kune surloke. (Ĉiu kunportos siajn specialaĵojn)

Ŝi foriros sabaton, la 17-an al Bourges.

Jen ŝia biografio:

"Mi studis en la Universitato de Bukureŝto, Fakultato pri psikologio. Ek de kiam mi finis mian studadon mi laboris kiel psiko-terapisto en Braŝovo, en la hospitalo por fervojistoj. En 2007 mi pensiiĝis, sed daŭre mi laboras en privata kliniko kiel psiko-terapisto.

Mi estas vidvino, 63 jaraĝa; mi havas du gefilojn.

En 1995 mi aliĝis al rumana esperanta asocio de fervojistoj kaj mi komencis studi Esperanton memstare. Ĉar tiam en Rumanio mankis E-kursoj, E-lernolibroj kaj Esperantaj-rumanaj vortaroj, mi uzis kiel lernilo la korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj. En 1996 mi partoprenis la unuan IFEF-kongreson en Hago kaj poste mi ĉeestis multajn aliajn esperantajn aranĝojn, kiuj helpis la plibonigon de mia kapablo uzi E-on.

En la jaro 2001 mi estis elektita kiel prezidantino de REFA (Rumana Esperanta Fervojista Asocio) kaj ek de majo 2010 mi estas prezidantino de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio).

Plie, mi gvidas Esperantan klubon "Amikeco" en Braŝovo.

La plej gravaj eventoj kiujn mi organizis en tiuj postenoj estis:

- la 57-a IFEF kongreso, okazinta en Braŝovo, en 2005, kiun ĉeestis pli ol 250 personoj el 22 landoj;
- la 63-a SAT-k, en 2010, en Braŝovo, kun partoprenantoj el 17 landoj;
- preskaŭ ĉiun jaron ek de 2003 la braŝovaj esperantistoj organizis VISE (Vintra Internacia Semajno por Esperantistoj) dum la lasta plena semajno de februaro, kiu koincidas kun SIA (Semajno Internacia de Amikeco);
- en la lastaj ses jaroj, ĉiun jaron ni gvidis por esperantistoj kvar tagan ekskurson en Delto de Danubo (la plej juna teritorio de Eŭropo).

En la jaroj 2006, 2007, 2008 mi rondiradis Bretonion, kie mi prelegis pri Rumanio en pluraj Esperantaj kluboj.

En septembro 2011 mi vizitis Belgion, kie mi estis invitita prelegi en 7 E-kluboj.

Mi gvidis E-kurson en kastelo Greziljono (2007) kaj en 2011 mi gvidis "kurson por babilantoj" en Pluezec.

2/ Kiel temo de mia prelego mi proponas **prezentadon de Rumanio el geografia, historia, socia, kultura kaj turisma vidpunkto**."

PROCHAINES DATES IMPORTANTES

Mercredi 14 mars, Rodica Todor qui fera une tournée de conférences en France, arrivera de Caen, Le soir nous l'inviterons à participer au cours de 3ème degré et à notre moment de conversation.

Vendredi 16, à 17h30, salle 121 aux Halles, Rodica Todor nous présentera la Roumanie.

Après cette conférence, nous dînerons ensemble sur place. (chacun apportera ses spécialités)

Elle partira samedi 17 pour Bourges.

Voici sa biographie :

"J'ai fait mes études à l'Université de Bucarest, dans la faculté de psychologie. Dès la fin de mes études, j'ai travaillé comme psychothérapeute à Braŝov, à l'hopital des cheminots. En 2007 j'ai pris ma retraite, mais je continue à travailler dans une clinique privée comme psychothérapeute.

Je suis veuve, j'ai 63 ans, j'ai une fille et un fils.

En 1995 j'ai adhéré à l'association espérantiste roumaine des cheminots et j'ai commencé à étudier l'espéranto en autodidacte. Comme à cette époque, en Roumanie, il n'y avait pas de cours d'espéranto ni de livres pour l'enseigner, ni de dictionnaire Espéranto-Roumain, j'ai utilisé la correspondance avec des espérantistes étrangers pour l'apprendre. En 1996 j'ai participé au premier congrès de l'IFEF à La Hague et ensuite je suis allée à beaucoup d'autres rencontres espérantistes qui m'ont permis de me perfectionner.

En 2001 j'ai été élue présidente de REFA (Association roumaine des cheminots espérantistes) et depuis mai 2010 je suis présidente de IFEF (Fédération internationale des cheminots espérantistes).

En outre j'anime le club espérantiste "Amikeco" à Braŝov.

Voici les évènements les plus importants que j'ai organisés :

- le 57ème congrès IFEF à Braŝov en 2005 avec la participation de plus de 250 personnes de 22 pays ;
- le 63ème congrès de SAT en 2010 à Braŝov avec des participants de 17 pays ;
- presque chaque année depuis 2003 les espérantistes de Braŝov organisent VISE (Semaine Hivernale Internationale pour les Espérantistes) pendant la dernière semaine entière de février, elle coïncide avec la SIA (Semaine Internationale de l'Amitié) ;
- pendant les 6 dernières années, j'ai guidé pour les espérantistes l'excursion de 4 jours dans le Delta du Danube (le plus jeune territoire d'Europe).

En 2006, 2007 et 2008, j'ai fait une tournée dans les clubs espérantistes bretons pour des conférences sur la Roumanie. En septembre 2011, j'ai fait des conférences dans 7 clubs epérantistes belges.

En 2007 J'ai donné des cours d'espéranto au château de Grésillon et en 2011 à Plouézec.

2/ Je propose pour ma conférence **la présentation de la Roumanie, du point de vue géographique, historique, social, culturel et touristique.**"